

32-a Jarkolekto * Septembro 2018 * N-ro 110



MONTORO
Tie Gvadalkiviro karesas la historion.

Gazeto Andaluza

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.

Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto**.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto

REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)

DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.

IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ

REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ

COLABORADORES: Alejandro BURGOS ESCALANTE

Vicente HERRERA COBO

Carlos SPINOLA

Persikore Plum

ENHAVO

Esperanto en Andaluzio	3
La Lastaj Neandertalaj homoj loĝis en Andaluzio	12
Lingva Angulo: Gerundio en Esperanto	16
Mia Unua Esperanto-Evento	22
Poezia Angulo	26
Turismi en “ <i>Montoro</i> ”	28
Paĝoj pri Nia Historio.....	32
Flamenko: “ <i>Juan Peña El Lebrijano</i> ”	36
Misteroj kaj legendoj de Andaluzio.....	39
Krucvortenigmo kaj Rebuso.....	43
Humuro.....	46

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



ESPERANTO EN ANDALUZIO



➤ Tri Kongresoj okazantaj en Malago ~ Majo 2019

Kiel jam esas konata, dum la unua semajno de la monato majo 2019 okazos samtempe en Malago 3 esperanto-kongresoj: la andaluzia, la hispana kaj tiu internacia fervojista. Kompreneble, ĉi tiuj renkontiĝoj bezonas grandan laboron de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, la ĉefa organizanto de ĉi tiuj tri kongresoj.



Renkontiĝoj de tiuj kiuj respondecigas pri la organizado de la kongresoj jam okazis en Malago kaj en Kordovo, sed kompreneble, ĉi ĉio ne estas nur afero de kelkaj homoj, sed ja de la tuta andaluzia esperantistaro. Pro tio, ni petas al ĉiuj andaluziaj geesperantistoj aliĝi kaj ĉeesti la kongresojn, ĉefe al tiu Andaluzia kaj Hispana, okazonta de la 1-a ĝis la 5-a de majo en Malago.

Pri la loĝado la malagaj organizantoj jam solvis ĉi tiun aferon bonege, pro la fakto, ke eblas loĝi, kaj eĉ manĝi, sur la sama ejo kie okazos la

kongreso, tio estas la Dioceza Domo, ĉe belega zono de la urbo, tute ĉirkaŭigita de naturo. Kompreneble ne estas devige loĝi tie dum la Kongreso, temas nur pri la dispono, kontraŭ tre alloga kosto, de komfortaj ĉambroj tuj apud la kongresejo. Rilate koston de la aliĝo kaj la restado ĉe la Dioceza Domo, bv. viziti la TTT-paĝon de la kongresoj ĉe:

<http://www.esperanto-andalucia.info>

Tie troviĝas ankaŭ la aliĝilo kiu devos plenumi ĉiuj interesitoj partopreni en la kongreso(j).



Rilate la programon, ankoraŭ ĝi ne estas tute definitiva, tamen ni jam povas sciigi pri ĝi. La oficiala temo de la Hispana Kongreso estas: “Lingva Situacio en la Eŭropa Unio”, kun la celo pristudi la uzon de ĉiuj oficialaj lingvoj en Eŭropo, la situacio de la lingvaj tradukoj en Eŭropa Unio post la ebla *brit-eliro* kaj ankaŭ pri la ebloj peti oficialigi esperanton kiel alian oficialan lingvon en la europaj instancoj.

Kompreneble, multaj aliaj programeroj okazos, jen resumeto:

- **Prelegoj:**

- Malago, pionira urbo en Esperantujo, de Juan García del Río.
- Blas Infante, esperantisto. Kiel kaj kiam alproksimiĝis la patro de la Andaluzia Patrujo al Esperanto, de José María Rodríguez.
- Projekto Erasmus, de Fabián Jiménez.
- La Defendo de la Lingva Nacia en la Eŭropa de la Anglikanizado (hispan-lingve kun sur-ekrana traduko en esperanto), fare de Dámaso Suárez.
- Ĉu Eŭropa Unio vere havas 24 oficialajn lingvojn? La minoritataj lingvoj en Eŭropo, fare de Sean O’Riain.
- Propozicioj por enkonduki Esperanton en la Eŭropa Unio, far José María Rodríguez.
- Situacio de la angla lingvo en Eŭropa Unio post la brit-eliro, Federico Gobbo.
- Sferoj, scienc-fikcio kaj fantasto, fare de Miguel Gutiérrez Adúriz.
- Veturado tra la inter-planeda spaco, de Carlos Spinola.
- Kiujn lingvojn oni instruos estontece en Eŭropo? De Katalin Kovats.
- Hyperloop, la rapidega trajno, far José María Rodríguez.
- Ave en la Mekkon, rapida trajno kuras tra la arabaj dezertoj, de José María Rodríguez.
- Projekto Tubaro, fare de Pablo Busto.

- **Prezento de libro:**

- “La Fontano de la Sorto”, poem-libro de Ángel Arquillos López.

- **Teatro, muziko kaj spektakloj:**

- Arte y color andaluz, de Pedro Carrillo.
- Mia liriko kaj la muziko, de Miguel Fernández.
- Vivu la Teatro ! de Miguel Fernández, Ana Manero kaj pliaj gvidantoj.

- Koncerto de Kajto.
- Spektaklo de Grazia Barboni.
- Muziko: Juan Pablo Gamarro kaj Orkestro.

● **Atelieroj:**

- Mikro-rakontoj, gvidota de Miguel Gutiérrez Aduriz.
- Arkivado, de Jan Niemann.
- Vikipediaj paĝoj, de Laurent Vignaud.

● **Ekskursoj:**

- Alhambro en Granada.
- Malago.
- Arundo
- Zafarraya.
- Kordovo.
- Antekero.
- Nordo de Maroko (post-kongresa ekskurso)

Do, ne hezitu veni en Malagon komence de la venonta monato majo, tiam Vi povos ĝui agrablan E-etoson en Andaluzio. Memoru, ke pliajn informojn, kompletan ĝisdatigitan programon, aliĝilon kaj eblon rezervi loĝejon Vi povos trovi ĉe: www.esperanto-andalucia.info



21-a Andaluzia Kongreso
kaj
78-a Hispana Kongreso de
ESPERANTO
1a/5a Majo 2019

Kiel prelegantoj dum la venontaj Kongresoj de Esperanto okazontaj en Malago, ni devas elstari la partoprenon de:



D-ro **SEÁN Ó RIAIN** estas irlanda esperantisto kaj diplomato. Ekde 2002 li estas prezidanto de la Eŭropa Esperanto-Unio. Li prelegos pri la rolo de la minoritataj lingvoj en la Eŭropa Unio.

DENNIS KEEFE estas usona esperantisto, esperantisto de la jaro 2011 laŭ la revuo *La Ondo de Esperanto*. Li estras la projekton “Universitato de Esperanto” en Hajnano (Ĉinio). Li prelegos pri la projekto *Esperanto-Plaĝo*.



D-ro **FEDERICO GOBBO** estas itala esperantisto. Li estas interlingvisto, informadikisto kaj filozofo pri komputado. Ekde la jaro 2014 li okupas la katedron pri Interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo. Li prelegos pri la estonta rolo de la angla lingvo en Eŭropa Unio post la *brit-eliro*.



KATALIN KOVATS estas hungara matematikisto kaj lingvisto. Ŝi estas membro de la Akademio de Esperanto kaj respondeculo pri ekzamenoj de la Centro pri Fremdaj Lingvoj ĉe la Budapeŝta Universitato Rolando Eötvös. Ŝi prelegos pri la fremdaj lingvoj instruataj en la Eŭropa Unio.



Ĝis la monato marto 139 homoj jam aliĝis al la Malagaj Kongresoj de Esperanto. Kion Vi atendas? Aliĝiloj kaj kontakto ĉe: www.esperanto-andalucia.info

➤ Tago de Esperanto en la Gimnazio “Almenara” de Vélez-Málaga.

La pasintan monaton decembron, okaze de la Zamenhofa Festo, la Esperanto-grupo de la Gimnazio “Almenara” en Vélez-Málaga okazigis aktojn por diskonigi nian lingvon. Unue estas necese diri, ke tiu grupo ŝuldiĝas al la streboj de Fabián Jiménez, membro de nia andaluzia E-asocio kaj profesoro pri Historio en tiu gimnazio.



La disvastigo de nia lingvo fare de Fabián altiris la atenton ne nur de la lernantaro, sed ankaŭ de kelkaj profesoroj, kiuj profitas tagajn lerno-paŭzojn por iom-post-iom lerni la internacian lingvon.


Do, dum la pasinta monato decembro la esperanto-klubo de la Gimnazio decidis organizi ekspozicion kun desegnaĵoj faritaj de la gelernantoj, kies ĉefa punkto estis esperanto. Verdire, ili desegnis simpatiajn bildojn kun mallongaj sloganoj pri la lingvo. Ankaŭ okazis prelego pri la esperanta lingvo kaj movado fare de Carlos Spinola, membro de AEU, ankaŭ ĉeestis kelkaj membroj de la andaluzia asocio.



Tiu tago komenciĝis per solena hisado de la esperanto-flago en la Gimnazio, al tio sekvis tipa andaluzia maten-maĝo por ĉiuj lernantoj kaj profesoroj de la Gimnazio.

Tamen, la agadoj de ĉi tiu laborema klubo ne finiĝis tiam. Ili jam atingis stipendion de Eŭropa Unio por realigi projekton, kun la kunlaboro de aliaj eŭropaj gimnazioj de Italio kaj Francio, surbaze de esperanto kaj kadre de la agadplano por eŭropaj gimnazioj *Erasmus +*.

Do, lernantoj kaj profesoroj de la Gimnazio “Almenera” de Vélez-Málaga vojaĝos dum la venonta monato marto 2019 tra Eŭropo dank’al Esperanto, ni tut-plezure informos pri la okazigo de tiu vojaĝo.



Lastminuta informo !

La Budapeŝta Universitato Rolando Eötvös okazigos oficialajn ekzamenojn dum la Kongreso de Esperanto okazonta en Malago.

Dato de la ekzameno: la 4-a de majo 2019

Loko: Kongresejo de la Andaluza kaj Hispana Kongreso de Esperanto.

Informo kaj aliĝo:

<https://edukado.net/ekzamenoj/ker/andaluzio>

Sesioj: <https://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj>

Por pliaj informoj kontaktu: katalin.kovats@gmail.com

Ĉi tiuj ekzamenoj estas oficialaj pere de la Ŝtata Ekzamena Centro pri Fremdaj Lingvoj ĉe la Budapeŝta Supera Fremdlingva Trejnejo (ITK) de la Budapeŝta Universitato Rolando Eötvös (ELTE).

Ekzamen-nivevoj: B1, B2 kaj C1, kaj oni povas elekti la tipojn: parolan aŭ skriban aŭ ambaŭ (kompleksan)



LA LASTAJ NEANDERTALAJ HOMOJ LOĜIS EN ANDALUZIO

Neandertala homo, science *homo neanderthalensis*, estis prahomo unue trovita meze de la 19-a jarcento en Neander-valo en Germanio, pro tio la nomo donita al ĉi tiu homa speco de la irlanda anatomiisto William King. Laŭ la sciencistoj la neandertalaj homoj loĝis tra la tuta Eŭropo kaj okcidenta Azio dum la malfrua plejstoceno, tio estas inter 150000 kaj 35000 jaroj a.K.



De la unua eltrovo de ties restaĵoj en la jaro 1856 ĝis nun, proksimume 500 neandertalaj homoj estas malkovritaj, oni devas diri ankaŭ, ke oni kalkulas ke ne vivis samtempe pli ol 15000 el ĉi tiuj prahomoj en la tuta historio, sendube temas pri natura raraĵo.

Neandertalaj homoj adaptiĝis perfekte al malvarmo, tio estas videbla pro lia granda cerbo, lia mallonga sed robusta korpo kaj granda nazo. Rilate la cerbon, ĝi estis granda, preskaŭ 10% pli granda ol tiu de la moderna homo. La averaĝa alteco de la neandertaluloj estis 1,65 metroj kun fortaj kaj potencaj muskoloj. Ili loĝis ene de kavernoj, kvankam plejeble ili kapablis konstrui malgrandajn kabanojn, pro la fakto ke la kavernoj estas ege malsekaj kaj malvarmaj.

Ili sciis kiel uzi fajron, sendepende de la fajro produktita de la propra naturo kaj ili ankaŭ uzis ŝtonajn ilojn kaj lignajn lancojn. Rilate la kreemon de ĉi tiu prahomoj, ekzistas atestoj pri tio, ke neandertalaj homoj praktikis iujn formojn de religio, ja ili estis la unuaj homoj kiuj intence enterigadis siajn mortintojn.



Se paroli pri sociaj rilatoj, la plejmulto el paleo-antropologiistoj asertas, ke ili povus paroli, ili kuniĝis laŭ malgrandaj grupoj kiuj ne emis kontakti kun aliaj grupoj, kvankam interne de la propra tribo ili helpis unu la aliajn. Tiel, oni trovis restaĵojn de alt-aĝa neandertala homo sen brako, kun gravegaj vundoj en unu el la kruroj, tute blinda kaj surda, do, se tiu homo vivis dum multaj jaroj sendube tio suldiĝis al la helpo de aliaj membroj de ties grupo, male, li estus bona kaptajo por aliaj predantoj.

Nia nuna specio, *homo sapiens*, ne devenas el ĉi tiuj neandertalaj homoj, tamen la origino de ambaŭ specioj estas komuna, laŭdire ni ambaŭ devenas el la *homo heidelbergensis*. Rilate eblan miksiĝon inter ambaŭ specioj, *sapiens* kaj *neanderthalesis*, oni diras, ke ili povis hibridiĝi kaj havi komunajn idojn, tiel en Portugalio eĉ oni malkovris restaĵojn de bebo, kiu povus esti produkto de ilia miksiĝo.

Se paroli pri komuna idaro el neandertalaj homoj kaj aliaj specioj, oni devas diri, ke inter 1,5 kaj 2,1% el la genoj de la nuntempaj homoj devenas el tiuj neandertalaj, tio sendube pruvus, ke antaŭ miloj da jaroj okazis seksa kuniĝo inter ambaŭ specioj, kvankam tio ne estas ĝenerale akceptita de ĉiuj sciencistoj.

Nuntempaj esploroj atestis, ke la neardentalaj homoj malaperis proksimume antaŭ 40000 jaroj. Rilate la kialon de ties malapero, oni diras, ke ili ne sukcesis adaptiĝi al la klimataj ŝanĝoj, alia ebla kaŭzo de tiu malapero povus esti la alveno de novaj homaj specioj anatomie pli perfektaj, kiuj pli facile ĉasis la bestojn antaŭe ĉasitaj de la neardentalaj homoj kaj tio rapidigis la malaperon de la ne tiel bone adaptitaj neardentaluloj. Tiel, iom-post-iome tiuj robustaj kaj fortaj neardentalaj homoj lokiĝis en periferiaj zonoj de la eŭrazia kontinento.

Unu el tiuj lokoj, eble la lasta zono kie ĉi tiu pra-homoj loĝis estis Ĝibraltaro, en la sudo de Andaluzio, apude al la Mediteranea Maro kaj fronte al Afrika kontinento. Tion pruvas restaĵoj trovitaj ĉe la kaverno *Gorham* ĉe la rokego de Ĝibraltaro, datumitaj en la jaro 40000 a.K., nuntempe ĉi tiu kaverno kaj aliaj apudaj, estas konsiderataj de UNESKO kiel heredaĵo de la Homaro.



Kaverno *Gorham* en Ĝibraltaro

Laŭ la sciencistoj kiuj redaktis eseon pri ĉi tiu kaverno, la lastaj neardentalaj homoj okupis ĉi tiun kavernon ĉar ĝi estis proksime al sablaj ebenaĵoj, arbaro kaj ĉe-mara marĉejo kun granda diverseco de herbaĵoj kaj vertebruloj kaj tio, sendube, favoris la supervivon de ĉi tiuj pra-homoj, kiuj trovis en Andaluzio la lastan loĝejon por supervivi.



ALIĜU AL *Andaluzia Esperanto-Unuiĝo*

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: esperanto14@ono.com
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe la jena konto:

- BANKIA
ES80 0487 3225 1420 0000 6979

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2019

HAZTE SOCIO DE LA *Asociación Andaluza de Esperanto*

Si deseas colaborar en la difusión de la lengua internacional en Andalucía, ésta es tu asociación

Para hacerte socio contacta con: esperanto14@ono.com
Cuota anual: 20 € que se deben abonar en la siguiente cuenta:

- BANKIA
ES80 0487 3225 1420 0000 6979

Cuando pagues por favor informa de los siguientes datos:

- Nombre del nuevo socio.
- Concepto: Cuota 2019

Lingva Angulo

GERUNDIO EN ESPERANTO



Ĉi-numere ni pritraktos la temon “gerundioj”, tio estas: la adverba formo de la verboj, kun la senco de dependa propozicio. Gerundioj en esperanto ankaŭ estas konataj kiel “participo kun e-finaĵo”. La mencio en ĉi proponata difino de “e-finaĵo” estas komprenebla, pro la fakto, ke temas pri la adverba formo de verbo kaj estas sciate, ke en esperanto adverboj finiĝas per “e”.

Gerundio, aŭ participo kun e-finaĵo, montras kroman agon kiu rilatas al la subjekto de la frazo. Tio estas, sama subjekto partoprenas en du frazoj, en du propozicioj, tamen, anstataŭ diri du frazojn, unu por ĉiu ago, oni kunmetas ambaŭ frazojn.

Ekzemple:

Telefonante sian patron, li konis malagrablan novaĵon.
Telefoneando a su padre, él conoció una noticia desagradable.

Tio estas:

- Li telefonis sian patron kaj
- Li konis malagrablan novaĵon

Temas pri du frazoj, pri du propozicioj, ĉef-propozicio: *li konis malagrablan novaĵon* kaj la subpropozicio: *li telefonis sian patron*, kiu rilate al la ĉefa frazo difinas la momenton aŭ la kaŭzo, tio estas, li konis malagrablan novaĵon kiam li telefonis sian patron aŭ pro la fakto, ke li telefonis al sia patro.

Se paroli pri gerundioj en esperanto oni devas koni, ĉu la okazintaĵo priskribita de la subpropozicio, tio estas, tiu kie aperas la partecipo kun E-finaĵo, okazis pasintece, okazas samtempe aŭ okazos estontece rilate la ĉefan propozicion.

Do, ni devos uzi formojn: INTE / ANTE / ONTE.

Tiel, se tio jam okazis:

Studinte sufiĉe bone la lecionon, mi facile superis la ekzamenon.
Habiendo estudiado lo suficientemente bien la lección superé el examen con facilidad.

Tio estas, mi unue studis la lecionon kaj poste mi aprobis la ekzamenon.

Se tio okazas samtempe:

Promenante apud mia amata amikino, mi deklaris al ŝi mian amon.
Paseando junto a mi querida amiga, yo le declaré mi amor.

Tio estas, am-deklarlo okazis kiam mi promenis apud ŝi, nek antaŭe nek poste, sed ĝuste tiam.

Se tio okazos estontece:

Redaktonte eseon, mi devis legi multajn librojn.
Teniendo que (debiendo) redactar un ensayo, tuve que leer muchos libros.

Tio estas, unue mi legis multajn librojn kun la celo poste, redakti eseon.

Do, oni nepre devas koni kiam okazis / okazas / okazos la ĉefa propozicio rilate la ekziston de la frazo kie troviĝas la e-finaĵo.

Ni vidu pliajn ekzemplojn:

Laborinte en informadika entrepreno, li gajnis multe da mono.
Habiendo trabajado en una empresa informática, él ganó mucho dinero.

Tio estas: unue li laboris kaj pro tio li gajnis multe da mono. Ni uzas “laborinte” ĉar la frazo kie aperas la gerundio troviĝas en pasinta tempo rilate al ĉefa propozicio: “gajni monon”

Studante en la biblioteko, li konis ŝin.
Estudiando en la biblioteca, él la conoció.

Tio estas: li konis ŝin en la tempo kiam li studis en la biblioteko, nek antaŭ, nek post tiu momento, sed ĝuste tiam. Do, ni devas uzi “studanta”, ĉar temas pri as-tempo rilate la ĉefan propozicion.

Vojaĝonte en Kebekion, mi devas lerni la francan lingvon.
Teniendo que (debiendo) viajar a Quebec, debo aprender francés.

Tio estas: mi devas lerni la francan lingvon nun, pro la fakto, ke estontece mi vojaĝos en Kebekion. Ni devas diri “vojaĝonte”, ĉar temas pri afero okazonta estontece rilate la ĉefan frazon.

Tre grava afero rilate ĉi tiajn frazojn estas la fakto, ke en la ĉefa frazo kaj en tiu kie enestas la participo finiĝanta per “e” devas agi sama subjekto. Tiel, NE ESTAS EBLE DIRI:

Mia patrino kuiranta bongustan gazpaĉon, mia familio renkontiĝis ĉe ŝi.

~~“Mi madre habiendo cocinado un delicioso gazpacho, mi familia se reunió en la casa de ella”~~

TUTE NE !!!

Ni vidu, ke en ĉi tiu frazo ekzistas du subjektoj:

- Mia patrino kiu kuiris bongustan gazpaĉon.
- Mia familio kiu renkontiĝis ĉe ŝi.

Ambaŭ subjektoj (mia patrino kaj mia familio) estas malsimilaj, do ĉi tie ni ne povas uzi partupon finiĝantan per “e”.

Ni ja povus diri:

Kuirinte bongustan gazpaĉon, mia patrino invitis ĉiujn familianojn manĝi ĉe ŝi.

Habiendo preparado un delicioso gazpacho, mi madre invitó a todos los miembros de la familia a comer en su casa.

En ĉi tiu frazo ja ambaŭ subjektoj estas samaj (mia patrino, tiu kiu kuiris kaj tiu kiu invitis).

Por diri ĝuste la unuan frazon proponitan, ni povas diri:

Kuirita bongusta gazpaĉo de mia patrino, mia familio renkontiĝis ĉe ŝi.

Ni vidu pliajn ekzemplojn por klarigi la aferon sufiĉe bone:

- Verkante libron pri Almerio, mi vojaĝis tien la pasintan jaron.
Teniendo que escribir un libro sobre Almería, viajé allí el año pasado.

Tio estas: kiam mi vojaĝis en Almerion, mi ankoraŭ ne skribis tiun libron. La posta verkado de la libro estis la kaŭzo de la vojaĝo. La vojaĝon mi jam faris, pri la libro oni ne povas koni laŭ la frazo proponita, ĉu mi jam verkis aŭ ne.

- Verkinte libron pri Almerio, mi vojaĝis tien la pasintan jaron.

Habiendo escrito un libro sobre Almería, viajé allí el año pasado.

Tio estas: mi unue verkis libron kaj poste mi vojaĝis. Laŭ la frazo proponita libron kaj vojaĝon mi jam plenumis.

- Verkanta libron pri Almerio, mi vojaĝis tien la pasintan jaron.
Escribiendo un libro sobre Almería, viajé allí el año pasado.

Tio estas: mi vojaĝis en la sama momento (en la sama tempo) kiam mi verkis libron. Pri la libro, laŭ la frazo proponita, oni ne povas koni ĉu mi jam finis aŭ ne, tamen en la momento de la vojaĝo jam finita, mi verkis ĝin.

Nun, praktiku vi mem kaj traduku en esperanton jenajn frazojn:

Teniendo que ayudar a mi padre, fui a su casa la semana pasada.

Sciu ke:

- La vojaĝon mi jam faris.
- La helpo okazos post la vojaĝo.

Habiendo hablado con mi jefe, conseguí un nuevo puesto de trabajo.

Sciu ke:

- Mi jam atingis novan labor-lokon.
- Antaŭ ol atingi novan labor-lokon mi jam parolis kun mia ĉefo.

Debatiendo con mi amigo, me di cuenta de que él tenía razón.

Sciu ke:

- Mi notis en pasinta tempo, ke li pravis.
- Mi debatis kun mia amiko en la sama momento kiam mi notis, ke li pravis.

Vortoj kiuj povas esti utilaj al vi uzitaj en ĉi tiuj frazoj:

Ayudar: helpi

Puesto de trabajo: labor-loko

Debatir: debati

Darse cuenta: noti

Tener razón: pravi.

Solvoj al la proponitaj tradukoj:

- 1) Helponte mian patron, mi iris en lian domon la pasintan semajnon.
- 2) Parolinte kun mia ĉefo, mi atingis novan labor-lokon.
- 3) Debatante kun mia amiko, mi notis, ke li pravis.



Andaluzia Esperanto - Unuiĝo

Asociación Andaluza de Esperanto

Mia Unua Esperanto-evento

 *Alejandro Burgos Escalante*

La Junulara E-Semajno (JES) okazas ĉiujare ekde 2009, kiam kuniĝis AS kaj IS, en Meza Eŭropo (Pollando, Germanujo kaj Hungarujo). Ĝi estas organizata de la Pola Esperanto-Junularo (PEJ) kaj de la Germana Esperanto-Junularo (GEJ).

Ekde la 28-a de decembro de 2018 ĝis la 4-a de januaro de 2019 okazis en Storkow, Germanujo, la JES; mia unua esperanto-evento.

Kiel mi antaŭe menciis, ĝi komenciĝis la 28-an de decembro de la pasinta jaro. Mi vojaĝis per aviadilo el la flughaveno de Malago ĝis la flughaveno de Berlino. Mi veturis buse ĝis la JESejo, kiam mi eniris novan mondon, plena de espero kaj ĝojo. Dum la manĝado, post mia alveno, mi konatiĝis kun esperantistoj el diversaj landoj (Japanujo, Ĥinujo, Francujo, Germanujo, i.a.). Tio estas la magio de esperanto: ĝi rompas la murojn inter la popoloj. Nokte okazis la solema malfermo kaj la interkona vespero.



La dua tago enhavis riĉan programeron: prelegojn, kursojn, filmojn, teatraĵon kaj diskutrondojn. La unua prelego, kiun mi ĉeestis, temis pri sekureco en seksumado. Sed antaŭ tiu prelego mi havis kelkajn liberajn horojn, do mi esploris la ĉirkaŭaĵon de la gastejo. La

konstruaĵojn ĉirkaŭiris belega arbaro, kie oni povas spiri puran aeron. Tie trankvileco kaj silenteco kunvivis en tuta harmonio.

Fininta la tagmanĝo, atilieron pri la okcitana lingvo mi ĉeestis. Ni povis konstati tie, ke estas nuntempe multaj minoritataj lingvoj, kiuj certe malaperos se oni nenion faras. Ankaŭ ni komentis la lingvistikan situacion de tiuj lingvoj en kelkaj landoj (Francujo, Hispanujo, ktp). Mi ekkonis pli pri endanĝeraj lingvoj, grava temo sendube. Pro tio ke mi estas “novulo” (homo kiu neniam antaŭe partoprenis en JES) estis speciala aktivaĵo; la tiel nomata “novula programo”. Ĝin gvidis du helpantinoj (ambaŭ denaskuloj, Stela kaj Saci). Antaŭ la vespermanĝo kurso por progresantoj okazis. Tie oni povis lerni pri la uzado de “po”, la malsamo inter “por” kaj “pro”, kaj tiel plu. La plej bonaj aktivaĵoj estis post la vespermanĝo: teatraĵo pri la vivo de Zamenhofo kaj trinkomanĝa nokto (oni povas gustumi pladojn el pluraj landoj).



Alejandro kun Rakoen Martens
(maldekstre) kaj apud Bertilo
Wennergren (sube) okaze de la
Junulara E-Semajno



La tria tago tagiĝis kun agrabla pluveto. La unua prelego de la mateno nomiĝis “Kiel prezenti esperanton alloge, taŭge kaj ne mensogante”. Ĝin faris Peter Baláž, konata esperantisto, kiu eldonejon posedas kaj Esperantisto de la Jaro estis. Li ankaŭ prelegis pri literaturo kaj pri la projekto E@I en la sekvaj tagoj. Oni pritaktis la malfacilecon konviki homojn lerni esperanton. Pro tio oni devas prezenti esperanton

allege (kiel en la titolo). Ni ankaŭ diskutis iomete pri la agado en kelkaj landoj. Dum la nokto koncerton povis ĝui ni. Samtempe diskejo en la manĝejo estis starigita.

La lasta tago de la jaro alportis al ni belegan programeron. La unua prelego temis pri la agado de esperantistoj ĉe UN (Unuiĝintaj Nacioj) kaj UNESKO (Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo). Tie mi havis la okazon ekkoni Rakoen Maertens, kiu estas delegito de UEA kaj TEJO. Se vi volas scii pli: *esperantoporun.org*

Vespere ni pritaktis la lingvon “Arcaicam Esperantom”. Tiu lingvo ne celas anstataŭi esperanton, kompreneble. Ĝi nun estas la “praesperanto”, kaj estas uzata precipe en literaturo kiam oni volas soni arĥaïke. Antaŭ ol la novjariĝo ni ĝojis silvestran bufedon kaj tuj poste kelkaj esperantistoj lanĉis artfajraĵojn ekster la JESejo.

La nova jaro alportis al ni la prezenton de la projekto FEJ (Florigu Egalecon inter Junuloj), en kiu mi partoprenis. Vidu: *genraegaleco.tejo.org*

La plej bona afero de la tago estis sendube la koncerto de Kaŝi. Nin ravis lia belega kaj alloga voĉo kune kun la perfekta majstrecado de la piano dum la nokto (nokto fin’). La dua tago de la nova jaro estis trege interesa ĉar ni ekskursis. Esperantista berlinano ĉiĉeronis nin tra la malnova Berlino kaj ĝia neesprimebla historio. Li eksplikis la historion de la esperanto-movado kaj ankaŭ kuriozaĵojn al ni. Dum la nokto la internacia vespero, superba evento, okazis.

La lastan tagon Rakoen Maertens prelegis pri “Falsaj Novaĵoj” kaj li prezentis novan ludon esperanto (*misinformado.net*), kiu fakte temas ankaŭ pri tiuj falsaj novaĵoj (*fake news*, angle).

Ni adiaŭis la kongreson per koncertoj kaj, kompreneble, per la oficiala fermo. Dum la evento mi havis la honoron ekkoni al Bertilo Wennergren (muzikisto, gramatikisto, Esperantisto de la jaro, ktp).

Kiam mi estis foriranta el la JESejo, mi jam sopiris (mi kredas, ke mi jam havas la postkongresan sindromon).

Resume: mi ĝojis la kunestadon en fremda lando ĉirkaŭita de samlandanoj (el Esperantujo):



KION PLIAN ONI POVAS DEZIRI?



Poezia Angulo

Serçe de la fekunda tero

Mi vagis tiel longe
ĉe senhomaj marbordoj
serĉante la fekundan teron
kaj la varmajn brakumojn.

Viaj okuloj estis stellumo
kaj miaj manoj, bovloj el sal’.

Mi alvokis vin krie, kore,
mian voĉon dampis
la muĝado de ondoj
kontraŭ l’klifoj.

Mia karno estis stelpolvo
kaj viaj ostoj, skulptaĵoj el sal’.

Mi eniris en la tajdon
ripetante vian nomon
kvazaŭ litanion,
kvazaŭ helpkriion.

“Jen mi estas
kaj vi ne venas al mi”.

La veloj de mia animo
ŝveligitaj de l’vento
kaj la ŝelo de mia korpo
frakasita de la rokaro.

“Mi timas la timon,
ĉu vi ne komprenas?
Mi timas timi vin”.

La tempo forglitadis,
degutadis de miaj fingroj
kvazaŭ sala akvo,
kvazaŭ seka bordosablo.

Kaj mi malamis la salon
kaj mi malamis la tajdon
kaj mi sopiris la muskon
sur arbaj trunkoj.

La muziko de l’sferoj
estis la kanto en via gorĝo
kaj mi vagis ĉe senhomaj marbordoj
serĉe de la fekunda tero.

Persikore Plum



Turismi en ... Montoro (Kordovo)

Proksime al la limo inter Andaluzio kaj Kastilo, tie kie la rivero Gvadalkiviro desegnas rondan kurbiĝon kaj sur monto el kie devenas sia nomo, stariĝas Montoro, belega vilaĝo en la kordova provinco kaj ĉefurbo de unu el la plej belaj naturaj parkoj en la nordo de Andaluzio: la parko de la Sieroj de Kardenjo kaj Montoro.

Ekzistas arkeologiaj restaĵoj pruvantaj la fakton, ke tie jam sidejis homoj dum pra-historia epoko, kvankam verŝajne estis la grekoj tiuj kiuj fondis urbon tie sub la nomo *Epora*. Iberoj ankaŭ loĝis en la zono, arkitektaj strukturoj kaj tombejoj tion pravas.

Proksimume en la jaro 206 a.K. la urbo subskribis akordon kun la romia respubliko kaj ekde tiam, ĝi estis konsiderata *civitas foederata* (federaciita urbo). Pro la romianoj la urbo, sub la nomo *Epora*, estis grava punkto en la *Via Augusta*, vojo kiu unuigis la sudon de la Ibera Duoninsulo kun Romo.



Blazono de
MONTORO

Post la romianoj alvenis en la zonon la gotoj kaj la vilaĝo ricevis la nomon *Monte Gothorum*, aŭ “Monto de la Gotoj”, jen la origino de la nuntempa nomo de la urbo Montoro. Por la islamoj Montoro estis *Muntur*, ili starigis kastelon kaj konstruis muregon por protekti la urbon. En la jaro 1238 la kastilia reĝo Ferdinando la 3-a konkeris la urbon kaj li donacis ĝin al la Markizo de *El Carpio*, al ĉi tiu familio apartenis Montoro ĝis la 19-a jarcento, kiam malaperis ĉi tiu mezepoka rajto. Okaze de la napoleona invado de Hispanio, la francoj konkeris la urbon, kvankam tiuj suferis

grandajn damaĝojn, kaŭzitaj de la montoranoj, pro tio la hispana reĝo premiis la urbon, post la liberigo, pere de devizo sciiganta pri la lojaleco de la urbo.

Dum la civila milito en la 20-a jarcento, ĉe la ĉirkaŭaĵoj de Montoro okazis kruelaj bataloj kun la partopreno de internaciaj brigadistoj. Post la milito novaj kvartaloj grandigis la vilaĝon. Nuntempe Montoro estas urbo kun dekmilo da enloĝantoj, ties ekonomio baziĝas ĉefe sur la oliv-olea produktado kaj lastatempe ankaŭ sur la kampara turismo, dank'al la kreo de la Natura Parko de la Sieroj de Kardenjo kaj Montoro.

Monumentoj

Preĝejo de Sankta Bartomeo.

Ĉe centra placo en la urbo stariĝas la ĉefa preĝejo kaj monumento de Montoro: la preĝejo dediĉita al Sankta Bartomeo. Oni konstruis dum la jarcentoj 15-a kaj 16-a, kvankam post la civila milito oni devis rekonstrui ĝin, pro la damaĝoj kaŭzitaj dum la milito. Okulfrapas la ruĝa ŝtono uzita por la konstruo. Ĝi havas belegan gotikan portalon.



Ponto de *Las Doncellas*.

Konstruita en la jaro 1498 super la rivero Gvadalkiviro, ĝi unuigas la centran parton de la urbo kun eksteraj vilaĝoj. La kosto de la

ponto estis pagata de la montoranoj mem, ĉefe per la donaco de iliaj juveloj.

Muzeo de la Oliv-arbo ĉe la Domo *Las Tercias*.

Konstruita fine de la 18-a jarcento, ĉi tiu domo utilis unuamomente kiel tenejo de tiuj varoj atingitaj de la ekleziaj dekonaĵoj. Laŭ-stile ĝi estas nov-klasika konstruaĵo. Ĝi posedas malgrandan enirkorton. Nuntempe tie troviĝas la Muzeo de la Oliv-arbo.

Festoj

- Foiro de la Virgulino de l'Rozario.

Dum la monato oktobro okazas foiro omaĝe al la Virgulino de L'Rozario, temas pri tipa andaluza foiro. Oni devas elstari la aktojn honore al la plej aĝaj montoranoj.

- Foiro de l'Oliv-arbo.



La oliv-oleo estas la plej grava ekonomia rimedo en Montoro, do, ĉiuj du jaroj oni organizas foiron dum la monato majo, cele pritrakti aferojn rilatajn al oliv-arbo. Entreprenoj profitas ĉi tiun renkontiĝon por prezenti novajn ilojn por rikolti olivojn kaj produkti oliv-oleon.

- Festo de la Maja Kruco.

Dum la unua semajno de la monato Majo, honore al la kristana festo de la Kruco, ĉiuj stratoj, kvartaloj kaj domoj ornamas sin per floroj.

Gastronomio

Gastronomio en Montoro intime rilatas al la abundaj produktoj de la apuda montaro, ĉefe ĉas-bestoj kiel aproj, cervoj, kunikloj kaj perdrikoj aŭ fungoj. Bongusta estas la potenca “*ajo sopeao*”. Por prepari ĉiujn manĝaĵojn oni uzas la alt-kvalitan oliv-oleon de Montoro.

Tre famaj en la tuta Hispanio estas marcipanoj industrie produktitaj en ĉi tiu vilaĝo de la firmao “*La Logroñesa*”.

Venont-numere TURISMI EN ...

ALCAUDETE (Jaeno)

Ĉu Vi deziras kunlabori kun la revuo?

Ne hezitu sendi Viajn kunlaboraĵojn: artikolojn, desegnaĵojn, informojn, ludojn....

Gazeto Andaluzia estas la plej veterana esperanto-publikigaĵo en Andaluzio, tamen ĝi fariĝas tagon post tago kaj Via kunlaborado estas nepra.


Kontaktu kun: esperanto14@ono.com

Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

Francisco García Merchán *laborema kadiza esperantisto*

Francisco García Merchán naskiĝis en la ekstremadura vilaĝo *Almendralejo*, ĉe la badahoza provinco, en la jaro 1876. Komence de la 20-a jarcento li venis en Kadizon, altirita de la novaj tekstilaj negocoj ekigitaj tie de kantabroj kaj galegoj. Li lernis ĉion necesan por krei sian propran vendejon kaj tiel en la jaro 1915 li fondis en la populara placo *Palillero* la magazenon “*Almacenes Merchán*”, firmao kiu iom post iom fariĝis la plej grava loko en Kadizo se paroli pri vendejoj rilataj al vestoj kaj tekstilaj aferoj en la urbo Kadizo.



Francisco García Merchán
1876 - 1960

La entreprenaj demarŝoj de S-ro Merchán cele la kreon de novaj negocoj ne haltiĝis tiam, tuj poste li favorigis la aperon de novaj vendejoj kaj entreprenoj de li regitaj, tiel: *Moravia*, *Rosán*, *Chabola Blanca*, *Sánchez Peña S.L.*, *Río Frio I kaj II*, *Charing Cross* kaj la famegaj vendejoj en Kadizo *Bazar España* kaj *Almacenes Barcelona*. Li eĉ kreis firmaon por ebligi komercon bazita sub la kredito de la aĉetantoj: *Crédito Rucas*.

Francisco García Merchán ankaŭ apogis esperanton, lingvo kiun li lernis, disvastigis kaj defendis. Ne estas eble koni detale kiam li lernis la internacian lingvon, tamen sciante, ke jam en la Hispana Kongreso de Esperanto okazinta en Sevilo en la jaro 1928 li aperas kiel delegito de la E-movado en la urbo Kadizo.


En tiuj jaroj ankaŭ li kunlaboris en la fondiĝo de la *Sociedad Esperantista Gaditana* (Kadiza Esperantista Societo) kaj favorigis la instruadon de la internacia lingvo en la loka klubejo. Li eĉ prezentiĝis en la jaro 1929 al la provinca guberniestro por sciigi la aŭtoritatulojn pri la demarŝoj de la internacia lingvo en Kadizo.



Almacenes Merchán en Kadizo, la plej grava magazeno en tiu urbo kaj kreita de Francisco García Merchán.

En la jaro 1931 Francisco Gómez Merchán, nome de la esperanto-grupo de Kadizo, sendis peton al la Ministro pri Edukado de la ĵus naskita Hispana Respubliko por ebligi la instruadon de la internacia lingvo en ĉiuj lernejoj kaj gimnazioj de la urbo Kadizo kaj eĉ universitat-nivele, ĉar la peto inkluzivis ankaŭ la Medicinan Fakultaton kaj la Por-instruan Lernejon. En tiuj jaroj, komenco de la Hispana Respubliko, la *Sociedad Esperantista Gaditana* ankaŭ petis al la Urbodomo la nomigon de strato per esperantista nomo. La lokaj

aŭtoritatuloj tion akceptis kaj la populara strato *Barrié* ŝanĝis sian nomon per “Strato Zamenhof”. Kelkaj jaroj poste la Urbodomo ŝanĝis denove la nomon de la strato kaj denove oni nomigis ĝin “*Strato Barrié*”. La Urbodomo klarigis al la E-grupo de Kadizo, ke tiu nova ŝanĝo tute ne deziris forgesi la memoron de la aŭtoro de Esperanto, sed memori la admiranton Enrique Barrié, kiu tiome favoris la konstruon de milit-ŝipoj en Kadizo. Kompense, la Urbodomo promesis nomigi novan straton per la nomoj *Zamenhof* aŭ *Esperanto*. Bedaŭrinde la ekigo de la civila milito forgesigis la aferon.



Nuntempa Strato “*Francisco García Merchán*” en Kadizo

Post la civila milito kiu ajn agado favore al Esperanto en Kadizo ĉesis, eĉ kelkaj aktivaj esperantistoj kiuj ankaŭ aliĝis al maldekstremaj politikaj partioj estis forpasitaj, inter ili Vicente Ballester Tinoco. Tamen, Francisco García Merchán ne forgesis sian esperanto-agadon kaj kvankam la nova politika reĝimo en Hispanio ne favoris al internaciismaj ideoj, li aliĝis tuj al Hispana Esperanto-Federacio, post ĝia fondiĝo en la jaro 1947-a kaj li ricevis eĉ unu el la unuaj membro-numeroj.

S-ro Francisco García Merchán forpasis en la jaro 1960, nuntempe strato ĉe kvartalo kreita de unu el liaj entreprenoj ricevis la

nomon de la kadiza esperantisto laŭ akordo de la Urbodomo en la jaro 1970-a.



Januaro 1929-a. Fondiĝo de la *Sociedad Esperantista Gaditana*.
Meze de la unuaj membroj, kiel reprezentanto de la E-Movado en
Kadizo, staras Francisco García Merchán.



Historia Arĥivo de Andaluza Esperanto-Unuiĝo
Apartado de Correos 611
14080 Córdoba ~ esperanto14@ono.com

FLAMENKO

Juan Peña, El Lebrijano



Juan Peña Fernández
1941 - 2016

Juan Peña Fernández naskiĝis en la sevila vilaĝo *Lebrija*, pro tio li estis konata ene de la flamenka etoso kiel *Juan Peña El Lebrijano* (prononcu: Huán Penja El Lebrihano). Li naskiĝis ĉe cigana familio, tie oni spiris flamenkan etoson ĉiuloke, lia patrino estis María Fernández Granados, konata kiel *María La Perrata*, ŝi devenis el unu el la familioj plej konata ene de la flamenka mondo.

Unuamomente Juan ludis ankaŭ kiel gitar-ludisto, tiel lia premiero okazis kiam li akompanis al la kantistino *La Paquera de Jeréz* en la jaro 1950, li estis la gitar-ludisto. Tamen, post atingi la unuan premion en la flamenka konkurso de la jaro 1964 kiel kantisto, li fine dediĉis komplete al la kantado.

La plej grava kontribuo de *El Lebrijano* al la flamenka arto estis siaj konstantaj pruvoj unuigi flamenkon kaj simfoniaj verkoj. Alia karakterizaĵo de lia kantado estis la uzo de paroloj verkitaj de literaturaj verkistoj, tiel en la jaro 1972 li surbendigis la diskon "*La Palabra de Dios a un gitano*" (La Vorto de Dio al cigano), la aŭtoroj de la tekstoj estis poeto Félix Grande. Pere de tiu disko li kantis la tragedian historion de la ciganoj en Hispanio.

Li konis profunde la plej puran originon de la flamenka kantado, tiu kiu estas konata kiel la "ortodoksa flamenko", tamen li alvenigis

ankaŭ novajn stilojn. Li surbendigis diskon kun la Al-Andalusia Orkestro de Tanĝero en la jaro 1985, tiam li diskonigis la arabajn radikojn de la flamenka arto. Okaze de pliaj diskoj kiel *Casablanca* (1998) kaj *“Puertas Abiertas”* (Malfermitaj Pordoj) de la jaro 2005, li kunlaboris kun marokaj artistoj.

Li estis la unua flamenka kantisto ludanta ĉe la Reĝa Teatro en Madrido, tio okazis en la jaro 1979 kaj tiam oni diris, ke la templo de la plej alt-kvalita arto malfermis siajn pordojn al populara arto kiel la flamenko. Ofte li ankaŭ kantis en universitatoj. Li estis lerta esploristo de la origino de la flamenko kaj li ĉiam plendis pro la fakto, ke, laŭ li, ne ĉiuj novaj flamenkaj kantistoj deziris esplori kaj koni la antikvajn radikojn de la plej pura kantado.

Li surbendigis sian lastan diskon en la jaro 2008, temis pri *Cuando Lebrijano canta se moja el agua* (Kiam Lebrihano kantas malsekiĝas l’akvo). La titolo de la disko, kaj ankaŭ la verkisto de tekstoj en kelkaj kanzonoj, apartenis al la nobel-premiito Gabriel García Márquez. En la jaro 2019 oni kreis fondaĵon por memorigi la flamenkan la kulturalan riĉecon de unu el la plej puraj kantistoj en la flamenka arto, kiu samtempe renovigis ĝin.

LA RINGO

En puton via ringo falis
la trovonto via fianĉo fariĝos.
Kvin jam iris serĉi, sed neniu revenis.
Kvankam vi multe ploros, la sesa mi estos.
La sesa mi estos, la sesa mi estos, la sesa mi estos.

Dum vintra vespero, pluv’post pluvo
Mi rifuĝis sub ponto apud vi.
Ene de l’rivero vian manon vi al mi donis
Poste vi eltiris ĝin kun la ringo,
Kun la rigo, kun la ringo, kun la ringo.

Rondo-dance knabinoj man-premas sin
Girante ili daŭras la kanton
Divenu, divenu mian divenon.
Tiu kiu trovas la ringon, kun kiu edziniĝos?
Kun kiu edziniĝos, kun kiu edziniĝos, kun kiu edziniĝos.

Flamenkaj Muzik-Instrumentoj:



Gitaro



Kastanjetoj



Frap-skatolo

Danc-klakado



Polmo-frapetado

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La heredaĵo de la pastro



Iam loĝis en Granado tre malriĉa masonisto. Li havis multajn familianojn, kaj pro tio, ke li apenaŭ gajnis monon, ili vestis malbone.

Kvankam li estis treege maldiligenta, li estis preĝema kaj la horojn pasigis lin preĝante en la preĝejo. La pastro jam

konis lin, ĉar lin vidis ofte, kaj iun tagon la pastro iris al lia domo.

-Bonan tagon, bonulo -li diris-; pro tio, ke vi estas bona kristano, mi volus doni al vi ion por ke vi gajnu monon per laboreto, kiun mi planis.

La masonisto respondis:

-Volonte, pastro, se vi bone pagas.

La pastro asertis, ke se li faros tion, li ne bedaŭros. Tamen, la pastro avertis, ke li devas esti bandaĝita.

La masonisto ne kontraŭis, kaj bandaĝinta, la pastro lin irigis tra mallarĝaj stratoj, ĝis stratpordo de domo.

La pastro enmetis la ŝlosilon en la seruron kaj apertis la pezan pordon, kiun li ŝlosis kiam ili enirintis, kondukante, poste, la masoniston tra larĝa ĉambro en la internon de la konstruaĵo.

Kiam la pastro forigis la bandaĝiton el la okuloj, li troviĝis en korto, lumigante de oleolampo, kaj en la kortocentro estis fonto kun

pilono, kaj sub tio la pastro ordonis al la masonisto, ke li faru ian niĉon, lasinte al li brikojn kaj cementon.

Li laboris la tutan nokton, sen fini la laboraĵon, kaj je la sunleviĝo donis la pastro oran moneron, kaj poste li estis denove bandaĝita kaj kondukita al sia hejmo.

-Ĉu vi volonte –la pastro lin demandis– revenos kaj finos la laboraĵon?

-Certe jes, se vi bone pagas.

-Morgaŭ, je la noktomezo, mi revenos.

Tiel estis, kaj la laboraĵo finiĝis.

-Nun –diris la pastro– helpu min transporti kadavrojn, kiuj nepre devas esti entombigitaj en tiun niĉon.

La kompatinda masonisto ŝokiĝis pro tio.



Tremante la pastron sekvis li ĝis aparta ĉambro de la konstruaĵo, atendante vidi la teruran scenon, sed li trankviliĝis, ĉar li nenion vidis krom tri grandajn skatolojn ĉe la angulo. Pro la pezo, ili sendube enhavis monon, kaj per multe da laboro ili sukcese eltiris kaj enmetis la skatolojn en la tombon, kiu estis ŝlosita, kaj riparinta la plankon, neniu povis diri, ke tie ili fosis.

La masonisto, ĉiam bandaĝita, eliris tra alia elirejo, kaj post la irigado tra mallarĝaj stratetoj kaj la larga promenado, la pastro lin haltigis, al li du monerojn el oro donis kaj lin avertis:

-Atendu ĉi tie ĝis vi aŭdos la sonon de la katedrala sonorilo. Se vi antaŭ tio provas forigi la bandaĝon, al vi okazos malfeliĉo.

Kaj, dirinte tion, la pastro foriris.

La masonisto agis kiel la pastro diris, distrante per la sono de la oraj moneroj, kiujn li havis surmane, kaj tuj kiam la sonorilo de la katedralo sonis, li forigis la bandaĝon kaj li troviĝis en la riverbordo de la rivero Genil. Li rapide iris hejmen, kaj kun lia familio li ĝojis dum dekkvin tagoj la profitojn de du labornoktoj, kaj poste li reĝis malriĉulo.

Li daŭre laboris malmulte kaj preĝis multe, kaj festante ĉiujn religiajn festojn, dum lia familio estis tute malsata.

Kiam li sidis ĉe la pordo de lia domaĉo, al li alproksimiĝis riĉulo kaj avarulo, tre konata en tiu loko. La riĉulo rigardis al li dumlonge, kaj li diris:

-Mi scias, amiko, ke vi estas malriĉa.

-Tion ne povas nei mi, sinjoro, ĉar tion oni ja vidas.

-Do vi ŝatu labori, sed vi ne gajnos multe.

-Mi ne multe enspezas, sinjoro.

-Tion mi volis. Mi havas domon, kiu estas preskaŭ ruino, kaj mi devas elspezi amason da mono en reformoj, ĉar neniu volas loĝi tie. Pro tio vi plibonigu la domon, por ke ĝi estu loĝebla.

La masonisto iris kun la domposedanto al dezerta domo, kiu ŝajnis kvazaŭ faligonta, kaj kiam ili trapasis kelkajn ĉambrojn, ili alvenis al interna korto, pensante la masonisto, ke li ja konis tiun lokon.

-Ĉu ci povas diri al mi, kiu estis la lasta homo, kiu loĝis ĉi tie?



Ci tie loĝis maljuna kleriko. Oni diris, ke li estis treege riĉa kaj, pro tio ke li ne havis parencojn, li lasus la monon al la Eklezio. Li tuje mortis, kaj pastroj kaj monaĥoj kuris ĉi tien por preni la riĉaĵon; sed ili nenion trovis, krom kelkajn dukatojn en leda monujo. La homoj diras, ke oni povas aŭskulti dum la nokto la sonon de moneroj kie la pastro

loĝis, kaj eĉ kelkfoje veojn kaj ĝemojn en la korto. Pro tiuj onidiroj neniŭ volas loĝi en mia domo.

-Do -diris la masonisto-, lasu min loĝi ĉi tie kaj dume mi plibonigos la tutan domon.

La domposedanto akceptis tion, kaj la masonisto translokiĝis.

La tempo pasis kaj la domo estis tute restaŭrita. La homoj, tamen, neniam kuraĝis loĝi tie, do la masonisto daŭre loĝis en la domo.

Li ne multe laboris; tamen, senceie, la familio prosperis. Ili manĝis bonege, vestis pli bone ol antaŭe kaj ili iĝis konatuloj en Granado. Sendube ĉio estis pro la mono, kiu estis eltirita el la niĉo kie la masonisto kaj la mortinta pastro entombigis la skatolojn plenitaj el mono, t.e., la heredaĵo de la pastro.


Tio estas la legendo, kiun oni ofte rakontas en Granado pri spacohava domo en malluma strato de la Albaicín.

NOTO DE TRADUKO: *ci* egalas al la hispana vorto *usted*; oni ofte uzas ĝin nur en tradukoj.

Esperantigis: Alejandro Burgos Escalante.
Origina verko: *Leyendas de Andalucía*.



Nuda Krucvortenigo




HORIZONTALE

- A. En la italaj aŭtomobiloj.
- B. Inverse, sufikso montrantan doktrinon, movadon aŭ sistemon.
- C. Efektive ekzistanta kaj kontrolebla.
- Ĉ. Interparoli kun malsamopiniantoj kaj interŝanĝi argumentojn pri iu temo.
- D. En kunmetitaj substancoj vortero indikanta reakcion en organika sintezo.
- E. Inverse, movo en iu direkto.
- F. En la francaj aŭtomobiloj.


VERTIKALE

1. En la germanaj aŭtomobiloj.
2. Sen la lasta vokalo, ago de tiu kiu montras subitan gajecon.
3. Mistera reĝo kiun la profetoj opiniis liberigonta la hebrean popolon.
4. Inverse, perforte kaj brue disrompi.
5. Sen la lasta vokalo, eraro de la menso, pro kiu oni rigardas revojn kiel efektivaĵojn.
6. Finaĵo indikanta personon aŭ objekton, kiun oni submetas al iu procezo.
7. Vokalo kiu egalas al nenio.

Rebuso

- Ĉi tio estas necesa por tiuj kiuj deziras bone prelegi:
-

Solvo al la pasintnumera Nuda Krucvortenigmo.



Solvo al la pasintnumera Rebuso.

Nomo de fama usona filmo de la jaro 1999: *La sesa sento*.

Sur la bildo aperis vortoj, de la unua ĝis la kvina ili enhavas la literon T, tamen la sesa vorto ne enhavas tiun literon.

Do.... La sesa sen To → La sesa sento.

Ĉu la revuo plaĉas al Vi? Ĉu Vi ŝanĝus ion?

Ĉu io aldonebla? Ĉu forviŝi ion?

Komentu kaj proponu per jena kontaktilo:

esperanto14@ono.com



HUMURO



La numero 111-a de nia revuo aperos dum la monato aprilo 2019. Ni dankas Vian kunlaboradon, ĉar la eldonado de revuo nur estas ebla se ni ĉiuj kunlaboras. DANKON !

esperanto14@ono.com

GAZETO ANDALUZIA
Apartado de Correos 3142
14080 CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio)

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Vicprezidantino: Fátima Jiménez García
Sekretario: José María Rodríguez Hernández
Kasistino: María Dolores Torres Mateo
Voĉdonantoj: Jordi Lietor López
Antonio Rodríguez Gasch
Juan García del Río

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
 esperanto14@ono.com

TTT-paĝo: www.esperanto.ac
 www.esperanto-andalucia.info

Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

Aliaj utilaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net



ALIĜILO por la
78-a Hispana Esperanto-kongreso
 01-a ĝis 05-a de majo 2019
Malago, Hispanio

Ĉiu partoprenanto bonvolu plenigi kaj sendi apartan aliĝilon al retadreso:
ifef2019@esperanto-andalucia.info
marilo1950@hotmail.es

LKK- adreso:

Andalucia Esperanto Unuiĝo
 strato Anfora, 6-5° D, 29013-Malago (Hispanio)

Kongresa ret-paĝo: <https://esperanto-andalucia.info>

Familia nomo		Persona nomo	
Adreso			
Telefona:		Ret-adreso:	
HEF-AEU-ano : jes ne viro virino (forigu ne taŭgajn)			
Mi antaŭpagas jenan sumon :		Eŭro	
Per: ĝiro IBAN: ES57 2038 9814 83 6000595212 SWIFT/BIC: CAHMESMM			
Kotizoj en Eŭro	Ĝis 31.12.18	Poste	Sumo
A) HEF aŭ AEU-membro	35	55	
B) Ne membro	50	65	
C) Juna (1) membro de HEF, AEU kaj familiano	20	35	
D) Juna (1) nemembro, familiano	25	45	
E) Infano kaj studento ĝis 24 jaraĝa	5	5	
Ĉambro-perado po persono	5	5	
V1: Urbovizitado – Malago (piedire)	3	3	
V2: Urbovizitado – Malago, Botanika ĝardeno , per buso	8	8	
D1: Duontaga ekskurso: Zafarraya , kun faka vizito	15	15	
D2: Duontaga ekskurso: Antequera	12	12	
T1: Tuttaga ekskurso, kun tagmanĝo (pikniko): Ronda (*)	25	25	
T2: Tuttaga ekskurso, kun tagmanĝo (pikniko): Kordovo (*)	30	30	
A1: Tuttaga ekskurso, kun tagmanĝo (pikniko): Granado (*)	42	42	
Tranoktado laŭ ĉambro mendilo (minimume unu nokto)			
Aldonaj noktoj post la 5-a de majo (5€/nokte)			
Postkongreso: Norda Maroko (**)		unulita ĉ.	dulita ĉ.
Vendredo, 10.05 Malaga-Algeciras-Ceuta-Tetuan		255	225
Sabato, 11.05 Tetuan-Asilah-Tanger-Tetuan			
Dimanĉo, 12.05 Tetuan-Chaouen-Ceuta-Malaga			
Je aliĝo devas pagi: kongreskotizon, ĉambroperadon kaj tranoktadon laŭ elekto por minimume unu nokto. (+50% postkongreso kaze de ĝia rezervo). (**) Prioritaton por postkongreso havas la IFEF-kongresanoj. Signu la elektitajn servojn			
Entute :			
Pagita sumo :			
Restanta pago :			

(*) Pikniko inkluzivita kaze de kompleta pensio, alie devas esti aparte mendita.